



Norvega Esperantisto

ESP ERANTOBLADET

N-ro 8
1966

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
32-a (37-a) jaro
Monata

KLUBO ESPERANTISTA EN OSLO 50-JARA

La plej granda Esperanto-klubo en Norvegujo festos sian 50-jaran jubileon sabaton la 26-an de novembro 1966 en «Josefine», Josefinesgate 16, Oslo (kluba adreso: Poŝtkesto 942, Oslo 1).

Estis la fervora esperantistino f-ino Aagot Johansen (nun s-ino Aagot Sletterød) kiu iniciatis la fondon de nova klubo post la «endormiĝo» de la malnova esperantoklubo en Oslo (kiu aktive funkciis nur dum la jaroj 1906—1910). Al fondiĝa kunsido 28/11 1916 en Teatergaten 8 ŝi alvokis 20 personojn kiuj elektis s-ron Bjørn Ottesen prezidanto de la nova klubo kaj f-inon Aagot Johansen vicprezidanto.

La klubo bone laboris kaj la membraro kreskis iom post iom kaj supervenkis ĉiujn malfacilaĵojn, ankaŭ tiujn de la du mondmilitoj.

En la pasintaj 50 jaroj la membroj de Klubo Esperantista en Oslo energie laboris por Esperanto kaj interalie dum ĉiuj jaroj formis la ĉefestraron de Norvega Esperantista Ligo, krome aranĝis la Universalan Kongreson en

Oslo 1952 kaj la 2-an Nordlandan Esperanto-Kongreson en Oslo 1965, plurajn ekspoziciojn kaj publikajn kunvenojn grandskalajn, kaj estis reprezentitaj en ĉiuj Universalaj Kongresoj.

La klubo nun havas 152 membrojn, kaj ĝia prezidanto estas kontorĉefo John Berggreen. En kadro de la ĉi-aŭtuna jubileo la estraro preparas jenajn aranĝojn:

- 1) Solena festeno
- 2) Jubilea ekspozicio
- 3) Jubilea loterio
- 4) Broŝuro historia pri la 50 jaroj
- 5) Gazetara kampanjo
- 6) Intervjuo en la radio (kaj eble televido).

Al la jubilea festeno 26/11 estos invititaj 1 reprezentanto el ĉiu Esperantoklubo en Norvegujo kaj la ankoraŭ vivantaj fondintoj de la klubo, unuavice Aagot Sletterød kaj Bjørn Ottesen, krom la 3-a honora membro de la klubo, Tharald Dybing, kiuj dum multaj, multaj jaroj sindone laboregis por la klubo.

J. B.

Ĉu vi aŭskultas la Esperantajn radio-elsendojn?

Tio estas grava demando. Multaj radiostacioj en diversaj landoj regule sendas programojn en Esperanto. Oni sendas ilin por ni, por vi. Sed se la stacioj ne ricevas pruvojn pri tio, ke oni aŭskultas la programojn en diversaj landoj, oni ĉesigos la elsendojn. Tial ni sincere admonas vin: aŭskultu ofte la Esperanto-programojn, kaj poste nepre skribu al la stacio.

Nun Pola Radio, kiu ĉiutage sendas en Esperanto, elsendis enketon, petante ĉiujn aŭskultantojn respondi ĝin. Ĉi tie ni represas la enketon. Nun estas via tasko sendi vian respondon pri la demandoj rekte al Pola Radio:

«Aŭskultante Radion Varsovio»

Ni deziras ekscii, kion pensas la eksterlandaj aŭskultantoj pri la elsendoj de la Pola Radio por Eksterlando. Lige kun tio ni starigis ĉi-mal-supre demandojn, al kiuj ni atendas vian respondon en la internacia lingvo Esperanto.

1. Kial vi aŭskultas niajn elsendojn?
2. Kiom ofte vi aŭskultas? (ĉiutage,fojojn semajne, de tempo al tempo)?
3. Sur kiu ondolongo?
4. Kiujn el niaj konstantaj programeroj vi aŭskultas plej volonte?
5. Kiel vi aprezas kaj kiajn rimarkojn havas rilate nian radian ĵurnalon el la mondo kaj el la lando, kaj rilate la dissendatajn komentariojn?
6. Kiuj temoj koncernantaj la nuntempan Pollandon interesas vin plej multe?
7. Kiun muzikon vi plej ŝatas?
8. Ĉu vi opinias, ke via scio pri Pollando profundiĝis dank' al niaj elsendoj?

9. Kiajn rubrikojn vi dezirus enkonduki por konstante?

10. Ĉu la horo de la elsendado de nia disaŭdigo estas por vi oportuna?

Ĉiu aŭskultanto, kiu alsendos respondon al la supraj demandoj partoprenos lotadon de 500 premioj kaj memordonacoj, kiel: elfaraĵoj de la pola popolaro, diskoj kun pola popola, serioza kaj distra muziko kaj aliaj.

Respondojn oni devas sendi ĝis la 15a de januaro 1967 (decidas la dato de la poŝta stampo) al la adreso: Pola Radio, Varsovio, Poll., P.O. Box 46.

En la respondo ni petas skribi la antaŭnomon kaj nomon, precizan adreson, aĝon kaj profesion (por statistikaj celoj).

Priparolon de la respondoj ni sciigos pere de nia anteno 15. februaro 1967.

POLA RADIO

Jaroslav Hebky forpasis

Dum la lasta milito aperis en Oslo ĉeĥa samideano Jaroslav Hebký, devigita labori ĉi tie por la germanoj. Li estis veterano de Esperanto, kiu persone konis multajn el la unuaj pioniroj de nia movado. Pro sia ĉiama preteco rakonti pri siaj interesaj travivaĵoj kaj pro sia bona humoro li fariĝis tre ŝatata amiko de Klubo Esperantista en Oslo. Poste mi regule korespondis kun li dum 26 jaroj, kaj li ĉiam esperis trovi okazon denove viziti nin, en pacaj cirkonstancoj. — Lastan someron lia revo fine realiĝis per invito de Thor Andersen, ĉe kies somera domo grupo da klubanoj spertis gajan revidon kun nia malnova amiko. Nun mi ricevis la malĝojigan informon ke 10 tagojn post sia reveno al Praha s.ro Hebký subite forpasis. La memoro pri fidela, sincera kaj gaja amiko ĉiam restos inter ni, kaj ni deziras pacon al lia memoro.

C. Støp-Bowitz

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—
1/8 p. kr. 19,—.

LA LANDA KUNVENO en Sauda 1967

La Liga Estraro ĵus decidis akcepti kun danko la afablan inviton de Sauda Esperantoklubb okazigi la landan kunvenon 1967 en Sauda dum la Pentekosto.

Landa kunveno okazis en Sauda en 1939, kaj estas tre ĝojige ke la klubo tie nun denove deziras gastigi nin.

Sauda Esperantoklubb estas unu el la kluboj, kiuj montris plej gravan progreson dum la lasta jaro. Por helpi ĝin en ĝia sukcesa laboro estas esence grave ke niaj membroj grandnombre partoprenos en la landa kunveno.

Sed ne nur tio. Ni nun regule okazigas landajn kunvenojn nur ĉiun duan jaron. Du jaroj estas longa tempo, kaj en la nuna malfacila tempo por nia afero estas nepre necese por la Liga Estraro persone renkonti kaj rekte diskuti kun laŭeble multaj el la membroj en la tuta lando la pluajn planojn kaj laborojn por Esperanto en nia lando. Ni bezonas aŭdi viajn opiniojn kaj ideojn kaj aŭskulti viajn konsilojn.

Tial ni forte admonas al ĉiuj membroj jam nun plani sian partoprenon en la landa kunveno en Sauda je

Sciigoj de N.E.L.

Kotizoj por 1967. Por eviti interrompon en la liverado de Norvega Esperantisto estas grave ke ĉiuj membroj pagas siajn kotizojn frue. Klubanoj bonvolu pagi al la kluba kasisto, rektaj membroj rekte al N.E.L., prefere jam antaŭ Kristnasko.

Anoncoj en Norvega Esperantisto. La kotizenspezoj ne sufiĉas por eldoni dek plenajn 16-paĝajn numerojn de Norv. Esperantisto en la jaro. Sed kelkaj anoncoj estus bona helpo. Ni tial petas la membrojn varbi anoncojn por nia gazeto. Vidu la anoncprezojn sur ĉi tiu paĝo.

U.E.A.-kotizoj 1967. Por eviti interrompon en la ricevado de la Jarlibro kaj de la gazeto «Esperanto» ĉiuj Individuaj Membroj de U.E.A. devas nun laŭeble baldaŭ pagi sian kotizon por 1967. Pagu al la loka Delegito aŭ rekte al la ĉefdelegito por Norvegujo, s.ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118, Oslo-Bryn, — poŝtĝirokonto 133.29. Ni rekomendas al ĉiuj membroj aboni la jarlibron kaj la gazeton de U.E.A. La kotizoj por 1967 estas: Membro-Jarlibro kr. 25,00, Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton «Esperanto») kr. 50,00, Membro-Subtenanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton) kr. 75,00.

52-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Tel-Aviv, Israelo, 2.—9. aŭgusto 1967. Aliĝiloj estas riceveblaj de la Turisma Servo de N.E.L., Boks 942, Oslo 1. Pri planoj de komuna vojaĝo ni poste informos.

La oficeja fondaĵo. La Liga Estraro kore dankas al ĉiuj bon-

koraj, malavaraj donacintoj por tiu grava fondaĵo. Sed ni daŭre bezonas pliajn donacojn por teni la oficejon. Ĉiuj donacoj estas bonvenaj, ĉu ili estas grandaj, ĉu malgrandaj.

Taskotabelo por la kluboj. — *Novembro.* La estraro sendas registritan informon al ĉiuj membroj, kiuj ne ekzigis laŭ la statuto, sed de kiuj tamen revenis la poŝta enkasigilo sen pago, ke oni nun forstrekos ilin kiel klubanojn. La estraro admonas la klubanojn pagi la kotizojn por la venonta jaro. La Delegito de UEA ekkolektas la UEA-kotizojn por la venonta jaro kaj varbas novajn Individuajn Membrojn de UEA. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 3a jarkvarono. Okazis 1 estrarkunveno, kaj oni elsendis 1 cirkuleron al la kluboj. Kjell Gustavsen reprezentis N.E.L.n ĉe la UK en Budapeŝto, la norvegan registaron repr. Johan Matland. L. Anjer partoprenis la Komitatkunsidojn de U.E.A. dum la kongreso. Oni organizis prelegvojaĝojn de Hideo Sakaeda al Norda Norvegujo kaj de Aŝvinikumar' al Okcidenta Norvegujo. Kunlabore kun Eldonejo Esperanto oni organizis ekspozicion de Esperantaj lernolibroj kaj literaturo dum la landa kunveno de «Landslaget Moderne Språk» en Oslo. Oni planis la publikan utiligon de la rezultoj de la subskriba kampanjo kaj de la rezolucioj de la Kongreso en Budapeŝto. Oni decidis okazigi landan kunvenon en Sauda Pentekoste 1967, laŭ invito de Sauda Esperantoklubb.

La Liga Estraro.

LA LANDA KUNVENO — (daŭr.) Pentekosto 1967. Klopodu jam nun aranĝi tiel ke vi povos iri. La kluboj esploru ĉu ili eventuale povus iomete subteni reprezentanton, kiu eble alimaniere ne povos iri al la landa kunveno. Nia celo estu ke ĉiuj kluboj havu laŭeble multajn reprezentantojn, sed ĉiukaze almenaŭ unu.

Ni ankaŭ aparte admonas la rektajn membrojn grandnombre partopreni la landan kunvenon. Tio ja estas preskaŭ ilia sola okazo por persona kontakto kun la cetera movado en nia lando.

La Liga Estraro.

La rezultato de la subskribkampanjo en Norvegujo

La 31an de Julio finiĝis la kolektado de subskriboj al la propono pri Esperanto al U.N.O.; ĝis tiu dato kolektiĝis en nia lando 5841 individuaj subskriboj kaj la subskriboj de 39 organizaĵoj kun sume 635 994 membroj. Tiu rezulto ne estas brila, sed tamen ne malbona.

Inter la individuaj subskribintoj troviĝas pluraj elstaraj personoj en nia socio, i. a. ĉefministro Per Borten, 3 aliaj ministroj: Kjell Bondevik, Helge Seip, Egil Aarvik, 4 eksministroj: Halvard Lange, Helge Sivertsen, Birger Bergersen, Aase Bjerkholt, 39 parlamentanoj, Hans Vogt, rektoro de la universitato en Oslo, Konrad Nordahl kaj Per Aspengren, prezidanto kaj vicprezidanto de Landa Sindikataro Laborista, plie Trygve Lie, Odd Nansen, Thor Heyerdahl, Johan Falkberget, Geburg Åsland, Brynjulf Bull, urbestro de Oslo, Alfild Hovdan, turistĉefo en Oslo, k.m.a.

Inter la organizaĵoj troviĝas Ēn Verden (4000), Det norske totalavholdsselskap (20 000), Norsk Jernbaneforbund (19232), Norges Ungdomsherberger, Oslo (4950), Arbeidernes

faglige landsorganisasjon (576 000). — Malĝojiga fakto estas ke el la 22 norvegaj Esperanto-kluboj nur 7 subskribis, spite al apartaj petoj flanke de N.E.L.

Ni sincere dankas al ĉiuj kunlaborintoj, el kiuj kelkaj estis modele aktivaj.

Norvega Esperantista Ligo

Monkolekto al la Informadfondaĵo de N.E.L.

La 5-kronrulado — Listo 11:

Trygve Pettersen, Skorovatn	(kr. 20)
Tordis og Øiv. Johansen »	(kr. 20)
Emil Elstad »	(kr. 10)
Eva Christiansen .. »	(kr. 10)
Erling Salamonsen »	(kr. 10)
Sigrid og Arne Fagerli »	(kr. 15)
Oddbjørn Fagerli »	
Åse Karin Pettersen »	
Arne Fagerli »	
Frank Sæther »	
Ada Tuflåt »	
Milgodt Sandstedt »	
Ragna Pettersen »	
Entute	kr. 120,00.

Krome donacis:

Skorovatn Arbeiderkvinnelag	kr. 25
Distr.lege F. Kloumann,	
Skorovatn	kr. 50
Chr. Kloumann, Grorud	kr. 25

La Financa Komisiono de N.E.L.

Jubileoj

La 28an de septembro redaktoro *Tiberiu Morariu*, konata Cseh-instruisto kaj ĉefredaktoro de la sveda Esperanto-gazeto, estis 65-jara.

La 6an de oktobro la granda poeto D-ro K. Kalocsay estis 75-jara.

La 29an de julio profesoro *Gaston Waringhien*, la Prezidanto de la Akademio de Esperanto, estis 65-jara.

52-a UK de Esperanto

TEL AVIV, 2.—9. aŭgusto 1967

Alta Protektanto: Zalman Ŝolar, Ŝtatprezidanto de Israelo.

KOTIZOJ

La aliĝkotizoj validaj ĝis la 31a de decembro 1966 estas jenaj:

Kongresano	70,— ned.gld.
Junul. ĝis 20 jr.	21,— ned.gld.
Edz(in)o de kongresano	35,— ned.gld.
Univ. Stud. ĝis 30 jr. . .	34,— ned.gld.
Blindulo	27,50 ned.gld.

Rabatoj: a) Individua membro de UEA, kiu ricevas la jarlibron kaj la Revuon «Esperanto», rajtas rabaton de 20 ned.gld.;

b) Individua membro de UEA, kiu ricevas nur la Jarlibron, rajtas rabaton de 10 ned.gld.;

c) Edz(in)o de individua membro (de ambaŭ kategorioj) rajtas rabaton de 10 ned.gld.

Kongresano, kiu pagas la plenan kotizon (70 gld.), ricevas la revuon «Esperanto» dum la tuta kongresa jaro.

LIMDATO

Laŭ decido de la Komitato de UEA dum la 51-a UK, la aliĝoj por la 52-a Universala Kongreso estas akceptataj ĝis la 22-a de junio 1967. La limdato indikita sur la aliĝilo (30/6-67) estas sekve nevalida.

UNUA BULTENO

La 4-paĝa grandformata Unua Bulteno kaj la Aliĝilo estas riceveblaj senpage ĉe la Landaj Asocioj kaj Ĉefdelegitoj de UEA, ĉe la Kongresaj Perantoj kaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

GLUMARKO

Estas aĉetebla ĉe la Libro-Servoj de la Landaj Asocioj kaj de UEA bela kolora glumarko eldonita okaze de la 52-a UK. Prezo: 0,50 ned.gld. (2,- st.) por 10-glumarka folio.

STATISTIKO

(je 22/9-66). Arg. 1, Aŭstral. 1, Aŭstr. 1, Belg. 3, Braz. 2, Brit. 10, Bulg. 24, Ĉeĥ. 16, Danl. 2, Finnl. 1, Franc. 25, Germ. 5, Hisp. 2, HongKongo 1, Hung. 34, Israelo 15, Ital. 5, Jap. 3, Jug. 18, Kan. 1, Mon. 1, Ned. 8, Norv. 3, Nov-Zel. 1, Poll. 80, Rum. 1, Sovet 1, Sved. 10, Svis. 3, Usono 2. Entute 280 el 30 landoj (pasintjare 142 el 26 landoj).

RIPOZOJ

Dumonata, multkolora ilustrita, 48-paĝa revuo — la plej luksa en la esperanta mondo.

Abonu ĝin, ĉar en momento de ripozoj sur la paĝoj de RIPOZOJ vi trovos ne nur varian legaĵon en perfekta lingvo, sed ankaŭ valorajn informojn pri Bulgario: internacia turismo, kultura vivo, historiaj monumentoj, unikaj naturbelaĵoj, marborda feriado, sporto, folkloro, filatelio, esperanta movado, lingvaj demandoj. Por elekti la landon kaj la lokon de viaj feriaj ripozoj, konsultu «Ripozoj»!

«Ripozoj» publikigas senpage adresojn en la rubriko «Korespondado».

Eksterlandaj esperantistoj, vizitantaj Bulgarijon, estas bonvenaj en la redakcio de «Ripozoj».

Abonu «Ripozoj» kontraŭ \$ 3,00 aŭ egalvaloro.

Sumojn sendu al:

**UEA, Nieuwe Binnenweg 176
Rotterdam-2, Nederlando**
aŭ al:

**Redakcio RIPOZOJ,
bulv. Tolbuhin 51, Sofia, Bulgario**

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

La Urso, Sarpsborg,

aranĝis 15/9 en la Urba Biblioteko publikan kunvenon kun prelego de nia hinda gasto d-ro Aŝvinikumar'. Antaŭ la kunveno aperis pluraj artikoletoj en la du urbaj gazetoj. La Biblioteko mem zorgis pri afiŝoj en siaj ejoj, kaj aranĝis ekspozicion de libroj pri Hindujo. La esperantistoj en Halden kaj Fredrikstad estis invitataj al la kunveno, pri kiu la gazetoj favore raportis, ankaŭ kun intervjuoj kun d-ro Aŝvinikumar'.

D-ro Aŝvinikumar' faris tre favoran impreson per sia perfekta Esperanto, per sia brila formo, per siaj grandaj scioj kaj per sia tuta personeco. La relative granda aŭskultantaro (la granda studejo estis pli ol duone plena) kun intereso aŭdis pri la sociaj kaj aliaj ŝanĝoj okazintaj kaj okazantaj en Hindujo.

La postan tagon D-ro Aŝvinikumar' instruis en la Gimnazio de Sarpsborg, kaj por tio kompreneble ricevis sian honorarion. Li estas tre bona ambasadoro por Esperanto.

Klubo Esperantista en Oslo

En la kadro de varbado de novaj 1/9. En la kadro de varbado de novaj membroj aranĝiĝos kursoj dum la aŭtuno — por komencantoj, progresantoj, studcirkloj — ankaŭ specialaj kursoj por funkciuloj de Oslo Lys-verker kaj eble por policistoj.

Kirsten Ek rakontis pri la 51-a UEA kongreso en Budapeŝto, unu el la plej belaj ĉefurboj de Eŭropo. En la kongreso partoprenis pli ol 4000 personoj el ĉ. 40 landoj. Speciale ŝi menciis la Artan Festivalon, kiu estis treege riĉenhava, kaj la inaŭguron de Esperantoparko en tre bela kaj centra loko.

Olav Reiersøl, kiu fine de aŭgusto partoprenis matematikan kongreson en Moskva, rakontis pri sia renkontiĝo kun esperantistoj tie.

Ĉi tiun fojon la klubo havis 2 eksterlandajn gastojn: Jukijoŝi Muramacu el Tokio, kaj Itamar Even-Zohar el Israelo, kiuj ambaŭ faris salutparoladojn. La prez. dankis kaj petis ilin transdoni niajn salutojn al iliaj kluboj.

19/9. La prez. deziris koran bonvenon, precipe al niaj 6 gastoj, inter ili Aŝvinikumar' el Hindujo, Jonathan Pool el Usono kaj Itamar Even-Zohar el Israelo.

Nia hodiaŭa preleganto estis Aŝvinikumar', kiu parolis pri «La lingva problemo de Hindujo». — Dum 2000 jaroj Hindujo estis sub fremda regado kaj la angla lingvo la sola oficiala lingvo uzita. En lernejoj, universitatoj k.t.p. oni instruis per la angla lingvo. Post la liberigo la centra registaro la 26/1 1950 decidis ke la hindia lingvo post 15 jaroj devos esti la oficiala lingvo en Hindujo. — La hindia lingvo estas artefarita, sed bazita sur sanskrito. Ĝi estas tute fonetika kaj kun nekomplicata gramatiko, tiel ke ankaŭ analfabetoj povas akiri konon de ĝi. Post la kafopaŭzo la preleganto citis poemojn en sanskrito, hindio kaj kelkajn kun esperanta traduko.

La prelego estis ege interesa, kaj la ĉeestantoj montris sian entuziasmon per forta aplaŭdo. Mi povas menciigi ke Aŝvinikumar' gajnis la unuan premion en la Oratora Konkurso de UEA en Budapeŝto.

La Esperantoklubo de Bergen

kunvenis 20/9 en Hotell Terminus. Por provi remembrigi antaŭajn klubanojn kaj aliajn antaŭajn adeptojn, ni sendis abundojn da cirkulerojn kaj invitis ilin al la kunveno.

La vicprez. Elsa Njøten malfermis la kunvenon kaj bonvensalutis kaj la

prelegiston kaj la ĉeestantojn. Ŝi tuj donis la parolon al la hinda D-ro Aŝvinikumar' kiu parolis pri Hindujo hodiaŭ. Li komence parolis pri diversaj religioj, superstiĉo, kastoj kaj subkastoj, kaj iliaj privilegioj tra miljaroj, ĝis la liberiĝo. — La novaj cirkonstancoj donis al la homoj liberecon kaj egalvalorecon. Li elokvente parolis pri la nova evoluo en sia lando, pri lernejoj, fabrikoj, komerco, la emancipado de la virinoj kaj teknikaj progresoj. — Post la prelego li volonte respondis la multspecajn demandojn. Kjell Offerdal estis, kiel kutime, la lerta tradukisto.

Post la prelego ni restis en la bela salono de hotelo, ekhavis kafon, buferpanojn kaj aliajn refresigaĵojn. Ni interparolis kun antaŭaj samideanoj kaj gastoj, kaj provis ilin esperantistigi.

Krom la fidelaj membroj de la klubo, nur kelkaj ne-esperantistoj ĉeestis.

Angla karavano en Halden.

Fine de julio nia klubo estis vizitata de 7 Esperantistoj el Bradford. Estis 5 junulinoj kaj iliaj gvidantoj, ges.roj Townson. Ili venis per «minibuso» kun subskribo «Learn Esperanto, the international language». En Halden ili vizitis «La fortikaĵon» kaj la ponton de Svinesund. Poste ni ĉirkaŭveturis la «Kvin-lagon» kaj vidis la kluzojn de Brekke. La tuton finis festeto ĉe la prezidanto.

S-ro Townson estis intervjuita de Halden Arbeiderblad. — «Pro kio «en la tuta mondo» vi lernas Esperanton, povante paroli la anglan?» H. A. demandas. «Ne ĉiuj en la mondo povas paroli angle,» s-ro Townson decide respondis. «Krom tio en multaj rilatoj estas grave paroli kun aliaj homoj en lingvo kiu ne igas ilin senti sin mal-superaĵ. En Esperanto ni renkontiĝas sur sama nivelo.»

La tri verdaj steloj de Løten

Iutage venis al la klubo cirkulero de NEL, kie inter alie menciĝis pri japana samideano, s.ro Sakaeda, kiu intencas viziti Norvegujon.

La prez. de La tri verdaj steloj de Løten, ekpensis ke la prez. de Løten Bygdeungdomslag pasintjare deziris ke iu venu al tiu asocio dum ĝia klubkunveno, por prelegi pri Esperanto, sed ke tiam neniu havis okazon por plenumi tiun deziron. Nun oni serĉis kontakton kun Løten Bygdeungdomslag denove, kun la propono ke la japana samideano venu kiel ĝia gasto al Løten, por dum kunveno prelegi kaj montri kolordiapozitivojn pri Japanujo, kaj ke esperantisto partoprenu kiel interpretisto. — La estraro de Løten Bygdeungdomslag decidis inviti la japanon, kaj 31/8 okazis la kunveno.

Je la honoro de Esperanto kaj la du esperantistoj, la kunveno estis bele ornamita per esperantoflagoj, kaj ĉeestis proksimume 50 gejunuloj, kiam la prez. de Løten Bygdeungdomslag, s.ro Sven Erik Opsahl malfermis la kunvenon, kaj esprimis koran bonvenon al la japano kaj lia interpretisto, s.ro Per Johan Krogstie. Vigle kaj humorplene la japano rakontis pri sia lando, ĝiaj kulturaj tradicioj, pri la multaj religioj, pri la vivo en japanaj hejmoj kaj pri la edukado de la gejunularo, kaj liaj kolordiapozitivoj estas bonegaj.

Oni konstatis ke la aŭskultantaro pritraktis Esperanton kun profunda respekto, kaj la modesta, simpatia Hidejuki Sakaeda tuj gajnis la korojn de ĉiuj. La kontakto fariĝis borega, kaj li devis respondi grandan aron da demandoj. — Li finis sian paroladon

al la Løtenjunularo kun la deziro, ke kiam li iufoje poste revenos, almenaŭ kelkaj el ili estus lerninta Esperanton, tiel ke interparolado sen interpretisto estu ebla.

Okaze de la eksterlanda, kaj eĉ ekster-eŭropa, vizitanto Løten Bygdeungdomslag aranĝis agrablan festotablon, kaj ĉirkaŭ la tablo, kun bon-gustaj kolbasoj kaj biero, la japano daŭre devis respondi je ankoraŭ multaj demandoj, precipe pri tiaj kiuj tuŝas agrikulturon, ĉar la ĉeestantoj ja estas okupitaj pri agrikulturo.

Sekve ili spertis ke Esperanto estas tre taŭga lingvo kaj interligilo inter landoj, popoloj kaj eĉ diversaj homrasoj.

1/9. La japana samideano Hidejuki Sakaeda tiam montris siajn kolordiapozitivojn al la Esperantoklubo, kaj li prelegis pri sia hejmlando. — Fine dum la kunveno oni trinkis kafon kaj babilis kun la japana amiko.

*Norsk Esperanto-Forbund
(Norvega Esperantista Ligo)*

Postadresse : Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse : St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon : 20 20 83
Kontortid : Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

*Esperantoforlaget A/S
(Eldonejo Esperanto A/S)*

Postadresse : Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse : St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon : 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A. :

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio :

Privata adreso de la ĉefredaktoro :
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun
adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.
Telefona : 54 7 27